MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

4

APRILO 2019 Kol. 408/35

axxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Debato pri lingvoj, Les Issambres, Finkalkulo, Pardonu, Nataŝa, Nordkoreiaj prezidentoj, Eŭropaj fervojoj, Interesa semajnfino, Tri invitoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Ni debatu pri la lingva situacio en Eŭropo

Post la Brit-eliro. La lingva situacio en Eŭropo estos la ĉefa temo de la 78-a Hispana kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝos en Malago inter la 1-a kaj la 5-a de majo 2019. La renkonto okazos preskaŭ koincide kun la kampanja periodo por la Eŭropa parlamento kaj kelkajn semajnojn post la (supozebla) eliro de Britio el Eŭropa Unio. Ĉu sencas, ke la angla lingvo konservu la privilegian rolon, kiun ĝi fakte tenas en la institucioj de EU?

Ĉu konserviĝos la nuna lingva reĝimo, karakterizita per teoria egaleco inter la oficialaj lingvoj, sed kun klara praktika dominado fare de iuj majoritataj lingvoj, establita per la forto de faktoj? Kiun favoras tiu fakta reĝimo? Ĉu la nuna malkontento pri Eŭropo en multaj landoj kaj tavoloj rilatas al tiu sistemo de dominado, pri kiu la lingvoj estas plua manifestiĝo? Ĉu neŭtrala internacia lingvo povus havi rolon en la nova lingva reĝimo, kiun oni nepre devos fiksi post la Brit-eliro?

Pri ĉio ĉi oni devus paroli en la venontaj monatoj kaj Hispana Esperanto-Federacio deziras esti parto de tiu ĉi debato, prezentante la rolon, kiun Esperanto povus ludi kiel neŭtrala komunikilo kaj kiel helpa ilo en la komunikado inter ŝtatoj. Dum tiu ĉi jaro 2019 ni planas organizi diversajn aktivadojn por konsciigi la ĝeneralan publikon kaj specife la politikistojn, ke alia lingva sistemo eblas en Eŭropa Unio, kaj ke nun estas la momento ĝin diskuti, kaj ne lasi devigi sin per la forto de faktoj.

El Eŭropa Bulteno 1/ 2019, sendis J.Drahotová

La 13-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres" 2. 3. – 9. 3. 2019

Jam de pluraj jaroj sinsekve okazas la Mediteranea Esperanto-Semajno en agrabla ĉemara loko en *Les Issambres*, kie tiutempe floras mimozoj. Flavaj buletoj forte odorantaj karakterizas la francan Provencon. Ili estas tradiciaj simboloj de feliĉo kaj de bonaj rilatoj. Ĉi-jare en la belega feriejo *Vacanciel* kuniĝis 93 geesperantistoj el dek landoj. Eĉ el la plej malproksima Siberio venis du partoprenantinoj. Samtempe la hotelo gastigis grupon da biciklantoj.

La sabata posttagmezo bonvenigis nin per aperitivo s-ro Silvain Ceccoto la estro de la feriejo *Vacanciel*. Post la vespermanĝo la organizantino de la aranĝo Christine Graissaguel prezentis al ni la ĉi-jarajn kursgvidantojn. Sekvis

interkonatiĝo. Mi informis la ĉeestantojn pri la fervojista kaj hispana kongresoj, kiuj okazos ĉi-maje en Malago.

Tuj la sekvan tagon komenciĝis instruado de Esperanto en kvar diversnivelaj kursoj. Pri komencantoj okupiĝis Christine Graissaguel, progresantojn instruis Michel Dechy laŭ la libroj de Tinĉjo. Li uzis ankaŭ "La bildstrioj kiel lernolibro", kajerojn, kiujn li eldonis. Katerina Arbekova el *Novosibirsk* uzis lud-metodan instruadon kun multaj bildoj, proverboj kaj mallongaj rakontoj. La plej spertajn lernantojn instruis Emanuele Regano

el Italio. Liaj filozofiaj prezentoj kaj debatoj pri diversaj temoj estis pripensigaj kaj nesolveblaj. Temis ekzemple pri problemo de etiko, justeco, perforto, vegetarismo kaj veganismo. Oni parolis pri genro kaj sporto, identeco de transgenro al transsekso. Okazis debato pri inkluziva lingvo ktp.

Dum la matenaj kafopaŭzoj, kiujn zorgeme pretigis Monique Prezioso kun sia amikino Simone Marlier, oni povis ne nur babili, trinki kafon aŭ teon, sed eblis ankaŭ saltadi trans la

saltoŝnuro kaj samtempe lerni la kanton «Dek boteloj pendas ĉe la mur'». Tion iniciatis Carmen Segarra. La partoprenantoj multe amuziĝis per tiu ludo. Laŭdezire ankaŭ eblis partopreni la programon de la hotelo.

La posttagmezoj estis dediĉitaj al ekskursoj kaj al agrablaj promenoj en la ĉirkaŭaĵo. Dum la tuta semajno regis agrabla suna kaj varma vetero. Du kuraĝulinoj eĉ banis sin en la maro. Iuj profitis liberan tempon por legi, komputili aŭ ludi kartojn.....

Al la okazaĵo venis ĵurnalistino por intervjui kelkajn samideanojn kaj fari komunan foton. Sabate aperis artikolo en la loka ĵurnalo *Varmatin*.

Dum unu posttagmezo ni vizitis ekspozicion pri orkideoj en *Roquebrune-sur-Argens* ĉe la familia entrepreno de Michel Vacherot, kiu funkcias ekde la jaro 1886-a. Ni admiris centojn da belegaj, diverskoloraj kaj diversformaj ekzotikaj floroj kaj aŭskultis konsilojn pri ilia kultivado kaj reproduktado. La vizitantoj povis ankaŭ aĉeti ilin.

Aliajn tagojn ni promenis ĉe la lagetoj *Villepey*, vizitis la urbon *Fréjus* kaj *St. Raphaël*. Interesa estis ekskurso al *Tourves*, kie troviĝas *Musée des Gueules Rouges*. Tie ni ricevis kaskojn kaj promenis en artefarita instalaĵo imitanta la baŭksit-minejon. La gvidantino rakontis pri la peza kaj malfacila laboro de la ministoj. Por tiuj laboroj estis uzataj ankaŭ azenoj lokitaj tie porvive. En la muzeo ni povis vidi maketo-instalaĵon de ĥemia procedo por produktado de aluminio el baŭksito. En vitrinoj estis prezentataj diversaj aluminiaj objektoj.

La vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj. Katerina Arbekova prezentis al ni sian ŝatatan landon Siberion. Ĉe la fino ŝi organizis nekutiman kvizon pri ĝi. Bonaj respondoj estis rekompencitaj per bombonoj, bildkartoj aŭ glaseto da rusa vodko. Michel Dechy parolis pri "La humuro en la verko de Hergé (*Herĵe*)". La temo de Emanuele Regano traktis "Arton kaj filozofiojn". Nina Korĵenevskaja prezentis al ni la urbon Ufa, kiu situas en Rusio apud Uralo kaj poste rakontis pri la folkloro en Rusio, kiun ŝi akompanis per bildoj. Ege interesa estis la filmo de Jean-François Cousineau pri "Ekspedicio en Suda Afriko". Dum la vizito de Namibio, Bocvano kaj Zimbabvo li spertis eksterordinarajn travivaĵojn kun sia edzino kaj aliaj partoprenantoj.

La 8-an de marto gesinjoroj Prezioso alportis bukedojn da mimozo plukitajn en ilia ĝardeno kaj ĉiu virino ricevis branĉeton por memorigi la Internacian Tagon de Virino.

Lastan vesperon la hotelo proponis aperitivon al la gastoj. La direktoro dankis al ĉiuj ĉeestantoj prezentante la tutan skipon de siaj kunlaborantoj. Niaflanke okazis adiaŭa vespero kun tombolo kaj diversaj artaj prezentoj. La kursanoj ludis diversajn teatraĵojn, deklamis kaj la Ĥoruso sub la gvido de Bernard Bigonnet kantis kelkajn Esperantajn kantojn. Dancado en akompano de akordiona muziko de la fratinoj Prezioso daŭris ĝis noktomezo.

Dankegon al la organizantoj de la bela evento kaj ĉefe al la familio Prezioso, kiu faris ĉion eblan por kontentigi ĉiujn partoprenantojn, kiuj trankvile ĝuis la semajnon.

Ĝis la revido venontjare! *Liba Gabalda*

Finkalkulo de AEH de la jaro 2018 + budĝeto por la jaro 2019

	budĝeto 2018	realo 2018	budĝeto 2019
Enspezoj			
interezoj el kuranta konto	10	0	0
donacoj	20 000	19 600	20 000
membrokotizoj	30 000	21 148	22 000
seminarioj	0	0	0
ekskursoj	0	0	0
Sume	**50 010**	**40 748**	**42 000**
Elspezoj			
materialoj	15 000	7 692	15 000
poŝto, telefono, interreto	26 000	25 641	26 000
riparoj, servoj	2 000	1 505	2 000
gazetoj, libroj	500	184	500
kunvenoj	3 000	94	1 000
impostoj	0	0	0
vojaĝelspezoj	1 000	0	1 000
banko	100	37	0
seminarioj	0	0	0
ekskursoj	0	0	0
donacoj	500	315	500
Sume	**48 100**	**35 468**	**46 000**
Enspezoj - elspezoj	**1 910**	**5 280**	**-4 000**

Lenka Angelová p.p.m.
prezidantino de AEH

Inĝ. Stanislava Nováková
p.p.m.
kontistino de AEH

E-versio de la libro "Pardonu, Nataŝa"

La interesega okazaĵo, kiun sovetia ekssoldato kaj policano



Sergej K. Dakov (vidu la foton) rakontas pri sia propra vivo, estas laŭvorte impresega. La leganto ĝin „englutos“ unuspire. Sed poste li povas enpensiĝi. Kiam li legas pri tio, kiel homoj dum la tempoj de subpremo kaj mallibero en Sovetunio ŝatis sian kredon kaj kion ili pretis pro ĝi suferi, ni povas demandi: „Kaj kiel tiun riĉaĵon aprezas mi?“

La tradukinto de la libro iom pli ol 100-paĝa estas Miloslav Šváček. La libro ne aperis presforme, sed eblas ĝin akiri el jenaj interretaj paĝoj: www.ikue.org/cz en versioj pdf kaj doc.

Jen fragmento:

Mi ekrigardis horloĝeton. Estis precize la oka kaj duono. „Sergej,“ – mi diris al mi, „post kelkaj horoj vi estos aŭ libera aŭ morta. Aŭ ankoraŭ io pli malbona – se ili vin ekvidos kaj eltiros el la akvo, ili vin sendos kiel dizertulon al laborlagero en Siberio kaj pli poste ili vin pafmortigos.“ Multajn en tiu ĉi momento ekregus duboj.

Estis ĉi tie do mi, Sergej Dakov, frekventinto de mar-akademio, eminentiĝinta en ĉiuj lernejoj, kiujn mi ekde la oka vivjaro vizitadis, prezidanto de Komsomolo, komisiita instrui ateismon al 1200 kunlernantoj de la akademio.

Post kvin tagoj mi estas devinta reveni al nia bazloko, kie mi devas fariĝi plenrajta ano de la Komunista partio kaj kie min atendas avantaĝa posteno ĉe polico. El praktika vidpunkto mi havis ĉiujn motivojn por reveni en Sovetunion. Sed tiuj ne sufiĉis al mi. Estu kio ajn, kion mi instinkte serĉis, mi sciis, ke

en la komunisma sistemo, kiun mi tiel bone ekkonis, mi tion ne trovos.
Tri kaj duona mejloj, mi ekpensis kaj mi pripensis miajn eblojn. En sekuro mi estos nur ĝis atingo de tiu ĉi vilaĝo. Se mi atingus nur marbordon, malproksiman duonmejlon, gardantoj povus min kapti. Nur la vilaĝo kaj homoj loĝantaj tie povas min helpi. Sed tio signifas, ke por naĝatingi ĝin mi bezonus almenaŭ unu horon.
Temperaturon de la akvo mi jam kontrolis. Kvin gradojn de Celsio. En teritorioj de la norda latitudo estas la tempo pasigita en la akvo demando de la vivo kaj la morto. Mi supozis, ke mi povas transvivi maksimume kvar horojn. Mi havis bonegan fizikan korpstaton. Regule mi hardiĝis kaj gimnastikis kun manhaltero. „Nun aŭ neniam," mi diris al mi. En profundo de la koro mi sciis, ke kajuto de la radiotelegrafisto estis lokita en la antaŭa parto, inter ŝipdirektilo kaj naŭtika kajuto de kapitano. Ĉar ni flosis en tuŝproksimeco de la marbordo, la kapitano senĉese observis situon de la ŝipo, por ke ni dumŝtorme ne kunpuŝiĝu kun iu el multaj ĉirkaŭaj rifoj.

Miloš Šváček

Koreia Popola Respubliko:

Nordkoreiaj prezidentoj ĉiam preferis vojaĝi en trajnoj

La fakto, ke la nordkoreia prezidento Kim Čong-un por viziti Beijing (Pekino) en januaro 2019 vojaĝis ne en multe pli rapida aviadilo, sed en sia speciala trajno, nur konfirmis la tradicion, kiun komencis antaŭ jaroj lia avo Kim Ir-sen (Esperante KIM Il-Sung). Tiu ĉi fondinto de komunisma Koreia Popoldemokratia Respubliko en sia timosento pro eventuala flugakcidento preferis kvankam multe pli longan, tamen pli sekuran vojaĝadon trajne sur reloj. Do kiam li en la jaro 1984 entreprenis sian plej

longan viziton en Eŭropo, en kiu li kun sia akompanantaro iom-post-iome vizitis tra Sovetunio Pollandon, Ĉeĥoslovakion, Hungarion, Jugoslavion, Bulgarion, Rumanion kaj Germanan Demokratian Respublikon, li vojaĝis en trajno.

Kim Ir-sen, kiu estris KPDR ekde la jaro 1948, forpasis en la jaro 1994, kiam anstataŭis lin Kim Čong-il kaj post lia morto en la jaro 2011 fariĝis prezidento kiel tria daŭriganto de la Dinastio Kim Čong-un.
Kiel anoncis je la 8-a de januaro la aŭstria ĵurnalo Der Standard (laŭ la artikolo en sudkoreia ĵurnalo "Chosun Ilbo"), la speciala trajno de Kim estas ŝirmita per ŝtala kiraso kaj disponas modernan komunikan teknikon.
Pli detalajn informojn pri ĝia internaĵo liveris la rusa eksdiplomato Konstantin Pulikovski, kiu en ĝi en la jaro 2001 havis eblon vojaĝi, kaj unu jaron pli poste li aperigis kelkajn detalojn pri ĝia ekipaĵo. "En la trajno estis proponitaj rusaj, ĉinaj, japanaj kaj francaj specialaĵoj (kun arĝentaj manĝ-bastonetoj), ĉe freŝaj omaroj oni servis specialajn francajn vinojn kaj la partoprenantojn (uzantojn) la kulinarajn ĝuaĵojn pliinteresigis kaj amuzis junaj trajn-akompanistinoj, kantantaj rusajn kaj koreajn kantojn", rememoras la iama diplomato de Putin.
(Laŭ la revuo Horizonto 1/2019)

Jindřich Tomíšek

Eŭropaj fervojoj

La trafikfakultato de la universitato en Pardubice, kunlabore kun la Ĉeĥa Fervojista E-asocio, organizis la 26-an de februaro 2019 internacian fakan seminarion pri la temo Eŭropaj fervojoj.

La seminario estis destinita por studentoj kaj por ĉiuj interesatoj pri fervojoj eksterlande. La prelegoj kaj diskutoj estis tradukitaj

el Esperanto al la ĉeĥa. La prelegantoj venis el Rumanio, Germanio, Danio, Italio kaj Ĉeĥio. Vespere antaŭ la seminario la gastoj estis akceptitaj en la E-klubo de d-ro Schulhof, kie ni ĉiuj (15 esperantistoj) tre bone amuziĝis.

Jarmila Rýznarová

Interesa semajnfino

Laŭ invito de junaj germanaj esperantistoj ĝuis 13 membroj de la grupo E-mental, en la 16. – 17. 3., trarigardon de la urbo Leipzig: memorindaĵoj de la urbocentro, universitato, Monumento de la batalo de nacioj kaj Panometero. La vespero okazis en la medio de agrabla amuziĝo en la luita socia salono de loka moderna preĝejo, inkluzive de la tranokto en propraj dormosakoj. Estis vere interesa semajnfino inter novaj geamikoj.

Lenka Angelová

I N V I T O J:

1) **A t e n t i g o** : La dato de la lingva seminario en Skokovy ŝanĝiĝas (pro neeblo tie bone hejti kaj pli bone varmigi la pensionon LA ESPERO).

La novaj datoj estas: 9. 5. – 12. 5. 2019.

Bonvolu skribi al mi, ĉu vi povas veni en tiuj majaj tagoj.

Jindřiška Drahotová

2) Nome de la organiza teamo mi elkore invitas vin aliĝi al Tutslovakia Esperanto-kongreso 2019, kiu okazos en la belega urbeto Liptovský Hrádok ĉi-jare!

La aranĝo okazos de ĵaŭdo la 9-a ĝis dimanĉo la 12-a de majo 2019 sub la ĉeftemo "Esperanto – subtenanto de multlingvismo kaj lingvo-protektanto". Se vi volas ekscii pli aŭ tuj aliĝi, jen ligilo por la kongresa retpaĝo:

http://ter.esperanto.sk/2019/index.php?akcia=text&co=enkonduko&jazyk=eo

Žeňa

3) Invito por partopreni ekspozicion:

"Otokar Březina – tradukoj de poemoj, aŭ ĉu ni interkompreniĝos en EU ?"

La malfermo de la ekspozicio okazos en la 11. 6. 2019 je la 17-a horo. En la senato (parlamento) de ČR (Valdštejnský palác) en Prago. (enirejo el „Valdštejnská ulice") La ekspozicio, kun eblo de trarigardo de la senatejo, estos alirebla ĝis 24.6.2019. La protekton transprenis la senatano Miloš Vystrčil.

La ekspozicio efektiviĝos okaze de la 150-a naskiĝdatreveno kaj la 90-a mortodatreveno de Otokar Březina, la okobla kandidato por Nobel-premio. Montro de kelkaj tradukoj en fremdaj lingvoj (de diversaj aŭtoroj) almemorigas ne nur limigitajn eblojn de

vastiĝo de la ĉeĥa literaturo eksterlande, sed ankaŭ gvidas al enpensiĝo pri interkompreniĝo de loĝantoj en multlingva Eŭropa Unio. La eblojn por trarigardo de la ekspozicio kaj senatejo sciigos al aliĝintaj interesiĝantoj sur la adreso dvořákovi.mb@volny.cz , la organizanto Inĝ.Viktor Dvořák, CSc. (ĝis komenco de majo). V. Dvořák

Agrablan travivon
de Paskofestoj
deziras al Vi
red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.